

# Sud-Rejna Kuriero

Majo  
2015

## Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°58

Espace 110  
FR-68110 ILLZACH  
CCP 19684 F Strasbourg  
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel  
Postfach 178  
CH-4005 Basel  
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj,  
karaj legantoj,*

*En la lasta numero jam aperis la agad-  
raporto por la jaro 2014. Intertempe okazis  
nia membro-kunveno, kies raportoĵ vi trovos  
en ĉi-tiu numero.*

*Komence de aprilo okazis en Verdun la  
printempa staĝo de nia federacio. Estis invi-  
tita Rodica Todor el Rumanio. Ŝi rekte flugis  
de Bukareŝto al Mulhouse kaj reen, tial an-  
taŭ ŝia hejmenflugo, nia grupo povis inviti  
ŝin al komuna manĝo en Sausheim.*

*Regule okazis niaj verdaj fadenoj en  
Saint-Louis kaj Mulhouse, tamen ne plu en  
la sama restoracio "Le printemps". Jacques  
esploros kaj informos nin.*

*En majo okazos gravaj konferencoj de ILEI en Neuchâtel en Svisio.*

*Jam en la lasta dimanĉo de majo komenciĝos la serio de  
"Vivu via strato" Per la reto ni organizos la deĵoradon.*

*En junio estas proponita "Amika Tago" en la Vogezoj organizitaj de  
Ginette kaj ankaŭ nia komuna manĝo, eble en Bartenheim.*



*Kapeleto memore al komplete  
malaperintaj vilaĝoj proksime  
de Verdun.*

*André Grossmann*

**Programo 2015****ESPERANTO - SOCIETO BASEL**

Ĵaŭde	28.05. 2015	19a	Kunveno en la greka restoracio en Inzlingen
Lunde	29.06. 2015	19a	Verda Fadeno en la Poste en Saint-Louis
<b>FERIOJ</b>			
Lunde	28.09. 2015	19a	Verda Fadeno en la Poste en Saint-Louis
Ĵaŭde	22. 10. 2015	20a	Monata kunveno en Riehenring: Programo 2016
Lunde	30. 11. 2015	19a	Verda Fadeno en la Poste en Saint-Louis
Sabate	12. 2015		Zamenhofa festo en Germanio

**KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2015-2017**

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

<b>Jaro</b>	<b>Kotizo</b>	<b>Abono</b>	<b>Kolora ekzemplero</b>
2015	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	14 eŭroj
2016	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	
2017	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

**<http://mulhouse.esperanto.free.fr>**

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

**[mulhouse-esperanto@yahoogroups.fr](mailto:mulhouse-esperanto@yahoogroups.fr)**

Por babilo en Esperanto ni uzas jenan dissendoliston:

**[verda-babilejo@googlegroups.com](mailto:verda-babilejo@googlegroups.com)**

Enskribiĝo: [verda-babilejo+subscribe@googlegroups.com](mailto:verda-babilejo+subscribe@googlegroups.com)

## Plädoyer für echte Mehrsprachigkeit durch vielsprachige Erziehung

Sprachunterricht hat in einem mehrsprachigen Land wie der Schweiz einen hohen Stellenwert und eine lange Tradition, dennoch scheiden sich im Rahmen der Diskussion um den Lehrplan 21 und HarmoS die Geister bezüglich des Unterrichts von 2 Fremdsprachen in der Primarschule und in mehreren Kantonen sind Vorstösse zur Rückkehr zu einem Regime von maximal einer Fremdsprache bis zur 6. Klasse hängig. Dabei wurde am 8. März 2015 im Kanton Nidwalden einer entsprechenden Initiative der SVP eine Abfuhr erteilt, in anderen Kantonen sind aber solche Vorstösse noch hängig. Wellen geworfen hat eine unlängst publizierte Studie der Pädagogischen Hochschule Schaffhausen, wonach beim Sprachunterricht Frühstarter gegenüber Spätstartern kaum Vorteile haben. Im nachstehenden Aufsatz werde ich diese Erkenntnisse untersuchen und kritisch nach den Ursachen fragen und Visionen für einen effizienteren Fremdsprachenunterricht vorstellen. Aus Sicht der Esperantobewegung sollten alle Menschen vielsprachig sein. Esperanto bietet dabei auch sprachlich weniger begabten Menschen die Chance zu einer echten Mehrsprachigkeit.

Bis in die 1990er Jahre begann in den meisten Deutschschweizer Schulen der Fremdsprachenunterricht erst in der ersten Sekundarschule, das heisst im 7. Schuljahr. Erstaunlicher-

## Pledado por vera plurlingveco pere de plurlingva edukado

Instruado de lingvoj altrangas en plurlingva lando kia Svislando kaj ĝuas longan tradicion. Malgraŭe la opinioj malsamas kadre de diskutoj pri la instruplano 21 kaj HarmoS\* koncerne la instruadon de 2 fremdaj lingvoj en la elementaj lernejoj. En pluraj kantonoj iel antaŭvidatas reveno al instruado de maksimume unu fremda lingvo ĝis la 6-a klaso. Ĉi-okaze estis nuligita koncerna iniciato de la partio SVP (Schweizer Volkspartei - Svisa Popola Partio) la 8-an de Marto 2015 en la kanton Nidwalden. En aliaj kantonoj tiaj atakoj ankoraŭ atendeblas. Antaŭ nelonge publikigita studo de la Pedagogia Altlernejo Schaffhausen (Ŝafhaŭzen) kreis ŝok-ondon. Laŭ ĝi en la instruado de lingvoj fruaj komencantoj ĝuas je preskaŭ neniuj avantaĝoj kompare kun malfruaj komencantoj. En la posta eseo mi pristudos tiujn ĉi ekkonojn, mi ilin kritike analizos kaj mi prezentos pli efikan instruadon de lingvoj. Laŭ la vidpunkto de la Esperantomovado, ĉiuj homoj devus esti plurlingvaj. Kaj Esperanto ofertas ankaŭ al homoj lingve malpli lertaj la ŝancon atingi veran plurlingvecon.

Ĝis en la 1990-aj jaroj la instruado de fremda lingvo komenciĝis en la plejmulto de la germanlingvaj svisaj lernejoj nur en la unua jaro de la dua-gradaj lernejoj, t.e. dum la 7-a lerneja jaro. Mirige tiamaj komparoj kun abiturientoj el Svislando kun abiturientoj

weise zeigten damalige Vergleiche von Maturanden aus der Schweiz mit Abiturienten aus Deutschland, welche bereits in der ersten Primarklasse entweder mit Französisch oder Englisch begonnen hatten, dass die Frühstarter gegenüber den Spätstartern über keine Vorteile verfügten.

Aufgrund von Erkenntnissen aus der Neurowissenschaft über die Entwicklung der Nervenverbindungen im Gehirn und aufgrund der Tatsache, dass in der Schule oder im Erwachsenenalter erworbene Fremdsprachen gegenüber den im Vorschulalter von den Eltern erworbenen Erstsprachen in aller Regel letztlich eben immer in gewissem Sinne fremd bleiben, verbreitete sich jedoch unhinterfragt die Annahme, dass der Erfolg des Fremdsprachenerwerbes desto grösser sei, je früher man mit dem Unterricht beginne. Die Annahme wurde indessen bis heute niemals wissenschaftlich untersucht oder empirisch bestätigt. Dennoch begann man aufgrund der Frühstarterbonushypothese und im Rahmen von HarmoS im Wunsch einer Vereinheitlichung des Fremdsprachenunterrichts in der gesamten Schweiz in den 1990er-Jahren auch in der Deutschschweiz damit, den Französischunterricht in die Primarschule vorzulegen. Dies stiess kaum auf Widerstand, da einerseits die Frühstarterhypothese bisher kaum jemals in Frage gestellt wurde und andererseits der Unterricht einer anderen Landessprache in der Schweiz eine lange Tradition hatte.

*Lic.phil.Dietrich M. Weidmann in :  
Svisa Espero 2015/1*

el Germanio, kiuj jam komencis la lernadon de la franca aŭ de la angla en la unuaj klasoj de la elementa lernejo, montris ke la fruaj komencintoj ne havis avantaĝojn kompare kun la malfrue komencintaj lernantoj.

Surbaze de ekkonoj de la neŭrosciencoj kaj de la evoluo de la nervokonektoj en la cerbo kaj ankaŭ surbaze de la fakto, ke kompare kun la kapabloj en la plej unua gepatra lingvo akiritaj en la antaŭlernejaj jaroj kun la gepatroj, fremdaj lingvoj lernitaj en la lernejo aŭ dum la plenkreskula aĝo finfine daŭre iel restas fremdaj. Tiel sin disvastigis la nekritike analizita supozo, ke la sukcesa akiro de lingvo estos des pli efika, se oni komencas la instruadon kiel eble plej frue. Intertempe ĉi tiu supozo estis ĝis hodiaŭ neniam science pristudita aŭ empirie konfirmita. Tamen surbaze de la hipotezo de pluso por la fru-lernintoj kaj en la kadro de HarmoS - pro la deziro de unuigo de la instruado de fremdaj lingvoj en la tuta Svislando en la 1990-aj jaroj - oni komencis ankaŭ en la germanlingva Svislando antaŭloki la instruadon de la franca lingvo en la elementan lernejon. Tio ĉi kvazaŭ ne renkontis reziston, ĉar unuflanke la hipotezo de la fru-lernado ĝis nun neniam estis pridubigita kaj aliflanke la instruado de alia enlanda lingvo havas en Svislando longan tradicion.

**HarmoS** : termino uzata de la Svisa Konferenco de la kantonaj direktoroj pri publika instruado por nomi decidon pri harmoniigo de la deviga instruado inter la diversaj svisaj kantonoj.

La Konferenco okazos en Svislando, en la urboj Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds, de la 13-a ĝis la 16-a de majo 2015.

Partoprenantoj el ekster Svislando povas surloke pagi sian kolokvokotizon.

La registaro de la Respubliko kaj Kantono de Neuchâtel invitis ĉiujn registarojn de la mondo sendi iun personon aŭ iun raporton al tiu kolokvo.

ILEI (la Internacia Ligo de Esperanto Instruistoj) estas la organizanto.

Formiĝis Honora Komitato el 31 personoj el Svislando kaj el la Esperanto-movado, kiu donas moralan subtenon al la evento.

Prelegos 12 fakuloj el 10 landoj.

### **Historia enkonduko**

La unua tia Konferenco okazis en Ĝenevo en 1922, la dua okazis en Prago en 1927. La Konferenco de 2015 estos la tria.

### **Celoj**

Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por lerni.

Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por instrui.

Agnoskoj de Eo en la diversaj instru-sistemoj, diplomigo pri Eo, estontaj paŝoj por evoluigi kaj firmigi tiun aspekton.

Instruista trejnado : kiel plibonigi

ĝin kaj diplomigi novajn instruistojn.

Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto (lernhelpa efiko) ilo al enkonduko por lingvoinstruado.

Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto kiel elemento en politiko de multlingvismo. Evoluigi strategiojn ĉirilate.

Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto en la kampoj de psikologio, akiro de interkulturaj kapabloj, solidareco, toleremo, malfermi la mondon al infanoj.

Kiel kaj kiom Eo povas kontribui al la jarmilaj celoj de Unesko kaj UN en la kampoj de alfabetigo kaj daŭripova evoluo?

Diversaj pedagogi-movadoj (Freinet kaj aliaj) en rilato kun Eo.

Interŝanĝo de spertoj.

Renkontiĝo kun lokaj fakuloj.

### **Laborlingvoj**

Profesiaj interpretistoj tradukos per samtempa interpretado ESPERANTO - FRANCA en ambaŭ direktoj. Ni akceptas tamen kontribuojn en aliaj lingvoj kondiĉe, ke la preleganto zorgas pri la traduko al unu el la du lingvoj.

*Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto - Programo*  
**(Al la eventoj en Aula des jeunes Rives la publiko havas senpagan aliron)**

Horo	ĝis	Evento	Lokoj
<b>Merkredo 13.05.2015</b>			
19	21	<b>Oficiala malfermo</b>	Aula des jeunes Rives, Neuchâtel
21	22	Vespera manĝeto	
<b>Ĵaŭdo 14/05/2015</b>			
09	12	<b>Kiel statas nuntempe la instruado de Esperanto</b> (lertigado de geinstruistoj, lernilo, lernado per interreto)	Aula des jeunes Rives, Neuchâtel
12	14	Tagmanĝo	Restaurant Café des Amis
14	18	<b>Spertoj pri la rolo de la instruado de Esperanto</b> en diversaj kampoj: psikologio, interkulturo, lernhelpa efiko de Eo	Aula des jeunes Rives, Neuchâtel
<b>Vendredo 15/05/2015</b>			
09	12	<b>Esperanto kiel elemento en lingvaj politiko</b>	Aula des jeunes Rives, Neu- châtel
12	14	Tagmanĝo	Restaurant Café des Amis
14	18	<b>Kiom Esperanto kontribuas al la konkretigo</b>	Aula des jeunes Rives,
18	21	La fina frando (je viaj kostoj)	malnova Neuchâtel
<b>Sabate 16/052015</b>			
09	09:30	Komuna transportado (buse)	Elirloko: rekte antaŭ la Urba Biblioteko, La Chaux-de-fonds
10:	12:	<b>Vizito de CDELI</b> (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia), sub la gvido de Claude GACOND, arkivisto de CDELI	Urba Biblioteko, La Chaux-de-Fonds
12	14	Tagmanĝo	Ital'Panini, La Chaux-de-fonds
14	15	<b>Kiuj aksoj por kiu estonteco?</b> Diskutgrupoj.	Urba Biblioteko, La Chaux-de-Fonds
15	16	<b>Fermo en sinteza formo</b>	
16	16:30	Re-iro al Neuchâtel, komuna transportado (buse)	Elirloko: rekte antaŭ la Urba Biblioteko, La Chaux-de-fonds

## Ĝenerala Asembleo de Mulhouse-Esperanto februaro 2015

La ĝenerala asembleo okazis en Espace 110 la 24an de februaro 2015 je la 18a30.

**Ĉeestantoj:** André Grossmann, Simone Kiry, Edmond Ludwig, Jacques Pineda, Yves Stutz, Bertrand Wick.

**Senkulpigitaj:** Roberto Kueny, Anne Vernet.

Legado de la lasta raporto. Unuanima akcepto de la raporto.

Legado de la agad-raporto (fare de la sekretario) de la jaro 2014. Unuanima akcepto de la raporto.

La kasisto prezentis la financan raporton. Unuanime akceptita raporto.

Por la jaro 2015 ni konstatis, ke nur 16 membroj pagis sian kotizon.

Finiĝis la mandatoj de: André Grossmann, Frédéric Porretti, Alain Sarrazin, Bertrand Wick.

André Grossmann, Alain Sarrazin, Bertrand Wick estis unuanime reelektitaj.

Frédéric Porretti ne pluvalidigis sian aliĝon al la asocio.

Simone Kiry estis unuanime elektita al la komitato anstataŭ li.

### La estraro nun konsistas el:

Prezidanto: André Grossmann

Sekretatio por la franca: Robert Kueny

Sekretario por Esperanto: Yves Stutz

Kasisto: André Grossmann

Eksteraj rilatoj kaj propagando: Jacques Pineda

Simone Kiry

Asesoroj: Alexandra Mussabini, Alain Sarrazin, Anne Vernet, Bertrand Wick.

Kurso por komencantoj kaj progresantoj:

Jacques gvidas kursojn en Maison du Temps Libre (2 lernantoj) kaj Maison de la Citoyenneté (3 lernantoj).

Ĝenerala diskuto pri la kialo de la mal-diligenteco de la lernantoj.

*Ĉu estas oportune aliĝigi aŭtomate la komencantojn al la asocio?*

*Ne, sed oni devas paroli pri la asocio kaj la Esperanto-historio.*

*Informi ne altrudi!*

Kurso por progresantoj: André gvidas regule kurson en Espace 110 por 4 lernantoj.

Verda fadeno: Bone funkcias. La kafejo Le Printemps havos eble novan posedanton ekde majo. Supozeble Jacques devos esplori por trovi novan lokon.

SRK: Aperas regule 4 foje. La lasta numero aperis iom malfrue. Ne gravas, plej grave, ke ĝi aperu. La bulteno estas sendata ne nur al membroj sed ankaŭ al abonantoj, al la membroj de la Bazela grupo, al Esperanto-muzeoj kaj interŝanĝe kun aliaj grupoj. Pluraj ricevas la retan version.

Nia retejo: <http://mulhouse.esperanto.free.fr>: diskuto pri la ebleco prezenti fotojn kun muziko. Bertrand pli fakas pri la temo kaj mencias eventualan devigon pagi al la sacem.

La dissendo-listo de la asocio havas 27 personojn, ne nur membrojn de ME. La nepagintaj membroj ne estas tuj eksigitaj de la listo.

Verda babilejo listo: la listo estis unue en yahoo. Sed subite la administranto ne plu povis mem aldoni membrojn.

Sed nun la listo estas ĉe google.

Andreo sendos la liston de la membroj ĉiu foje okaze de aktualigo.

Bertrand ankaŭ administras dissendo-liston. Tiu-ĉi entenas la personojn renkontitajn okaze de foiroj kaj aliaj okazoj, por sendi inform-mesaĝojn en la franca.

Estontaj agadoj:

- ◆ Vivu via strato en majo, junio, julio.
- ◆ La festo de la lingvo ne plu okazas.
- ◆ Bébéciné en Espace 110
- ◆ Ungersheim, ekologia foiro en novembro.
- ◆ Organizado de la Esperanta tago en oktobro: Jacques kaj Roberto kune klopodas.

Diversaĵoj:

- ◆ Venos irlandanoj meze de majo. Simone kaj Maria gastigos ilin. Ebleco organizi prelegon.
- ◆ En majo venos Thomasz Chmielik en Nancy. Ebleco organizi prelegon en Mulhouse.
- ◆ En aprilo venos Rodica Todor. Ankaŭ ebleco por prelego.
- ◆ Jarfina manĝo de la asocio: okazos je la 18a aŭ 25a de junio en Ensisheim (Ruĝa Bovo) aŭ en Bartenheim.

Antaŭ la fino de la kunveno, ni trinkis bieron alportitan de Andreo  
La kunveno finiĝis je la 20a.

La sekretario

Yves Stutz



## Roberto informas en lernejo



Iam, en septembro 2014 mi turismis kun mia edzino en la regiono “Alta Ĵuraso” kaj ni iris al la plej alta monto “Le Mont d’Or”. Promenante mi trovis restaĵon de kaŭĉuka balono kun ŝnureto, al kiu estis ligita etikedo kun personaj nomoj. “Ni sendis tiun balonon por la Paco en la Mondo”. Oni divenas skribaĵon de infanoj. “Ni estas la infanoj de la klaso n° ... de la Internacia Lernejo de Ĝenevo en Svislando”.

**Mi respondis al ili sendante la restaĵon de la balono.**

**En mia letero mi diris, ke mi estas Esperantisto, parolanto de la Internacia Lingvo, kiu estas la lingvo de la Paco.**

Post kelkaj semajnoj mi ricevis amason de desegnaĵoj de dek-ses infanoj aĝaj je 8/10 jaroj, venantaj de diversaj landoj: Hispanio, Argentino, Francio, Anglio, Italio, SudAfriko, Irlando, Libano, Svislando, Ukrainio, Israelo, Usono, Rumanio.

Ili miris, ke ekzistas tiu lingvo, kiun ili ne konas, kaj deziris ekkoni kaj la lingvon kaj ... Roberton!

Mi iris al Ĝenevo la 27an de februaro 2015 por renkonti ilin.

Ah! Kiel ĉarmaj estas infanoj, kiuj malkovras! Il diris ke venis Jul-avo!!

Ĉiuj volis skribi sian nomon en Esperanto! La restado

daŭris nur unu horon, (jam tro por infanoj!). Ili forlasis la lernejon je la tria post-



tagmeze, kaj ni ĵus havis tempon por fari foton de la tuta klaso, kun la du bildlibroj, kiujn mi donacis.

(Ili jam estis vestitaj por hejmeniri!).

La instruistino gastigis min en sia franca familia hejmo kaj mi forlasis la venontan matenon.

Ha! Se mi povus esti instruisto pri la internacia lingvo en Internacia Lernejo!

Feliĉo por mi!



**77a Regiona Staĝo de Esperanto  
la 3 - 4 - 5ajn de aprilo 2015  
en Collège Saint-Jean  
73 rue de Blâmont,  
55100 VERDUN**

La printempaj staĝoj de Esperanto-France-Est kutime okazas iom ekster la periodo de Pasko, semajnojn antaŭe aŭ semajnojn poste. Tamen ĉi-jare ĝi okazis ĝuste dum Pasko. Catherine Kremer estis preta organizi la kongreson de SAT-Amikaro en Verdun. Por eviti, ke nia printempa staĝo estu tro proksima de alia regiona evento, ni proponis al Catherine akcepti samloke kaj samtempe nian staĝon en Verdun.

Intertempe ni eksciis, ke la kongreso de SAT-Amikaro estis nuligita, tamen venis iom da SAT-membroj kaj la koncerto de Guillaume Armide povis okazi.

Pro tro malmultaj partoprenantoj ne plu eblis ricevi manĝojn en la kolegio, tial Catherine sukcesis elturni ĝi proponante manĝojn en la kafetario de proksima Cora, kaj memzorgante pri la mantenmanĝoj. Pro tiu situacio la etoso dum tiu aranĝo iĝis tute amika, eĉ familia. Finfine tio ege plaĉis al pluraj partoprenantoj.



Sabate matene okazis turisma gvidado tra la urbo Verdun. Bedaŭrinde pluvo kaj ombreloj akompanis nin, malgraŭ tio ni ĝuis la lertan gvidadon

En la kolegio Saint-Jean, vasta salono estis metita je dispono por la libro-servoj de Esperanto-France-Est kaj de SAT-Amikaro kaj aliaj klasĉambroj por kursoj kaj prelegoj.

Sabate posttagmeze Jean-Luc prezentis al la publiko plurajn novajn librojn, kiujn li laste akiris por nia libro-servo. Nun aperas pluraj interesaj verkoj kun belaj prezento el Rusio.

Poste komenciĝis la kursoj kaj prelegoj laŭ la kutimaj programo-skemoj de niaj staĝoj. El Rumanio estis invitita Rodica Todor. Sabate posttagmeze ŝi lerte gvidis konversacian kurson kaj klopodis paroligi la partoprenantojn. Sed la temo ne estis facila: "Kial okazas tiom da militoj tra la mondo?" Okazis viglaj diskutoj, sed ni certe ne trovis pravajn konkludajn respondojn.



La urbo Verdun estas ja konata pro la teruregaj bataloj okazintaj dum la unua mondmilito. Unu el niaj celoj estis vizito al tiaj dramecaj historiaĵoj.

Antaŭ la vespermanĝoj SAT-Amikaranoj prezentis historiajn eventojn rilate al Esperanto okaze de la unua mondmilito.







La distra vespero estis prizorgita de SAT-Amikaro, kiu invitis Guillaume Armide por koncerti.

Li mem piano-ludis kaj kantis el sia repertuaro en Esperanto. La publiko vaste aplaudis kaj bisis por pliaj kantoj.



La vespero finiĝis en la kolegio en simpatia vesper-knajpa etoso. Pro la ne multaj partoprenantoj, ĉio aspektis pli amika eĉ familia.

Dimanĉe okazis la prelego de Rodica pri Rumanio. Ŝi klarigis pri eventoj en la pasintaj jardekoj kaj pri la nuna situacio kaj ties problemoj. Multaj fotoj alloge prezentis la landon kaj ties kulturajn riĉaĵojn. Jam de iom da jaroj ŝi organizas turisman vojaĝon en la sud-orienta parto de la lando. Al la ĉi-jaraj ekskursoj ŝi

aldonis tri-tagan krosadon sur la delto de Danubo.



Por la dimanĉa tagmanĝo Catherine sukcesis lastmomente rezervi restoracion iom ekster la urbo. Kia elturniĝemo!

Posttagmeze estis la celo viziti la batal-kampojn. Unue ŝi montris lokojn, kie troviĝis antaŭ la milito 7 vilaĝoj, nun tute detruitaj . Nun tie staras tie kapelo kaj iom da monumentoj.



Poste ni atingis la gigantan monumenton de la ostejo de Douaumont.



Apude trans la strato, grandega tombejo.



Poste ni vizitis la internon de Fort de Vaux, kie soldatoj rifuĝis en malfacilaj kondiĉoj, kaj fine devis forfuĝi.



La dimanĉa vespermanĝo estas prizorgita de Catherine en amika etoso.

Lunde okazis lasta vizito al draĵeo-fabrikejo.



Ĉiuj varme dankis al Catherine pro ŝiaj sukcesa gvidado kaj lerta organizado.



## Akcepto de Rodica Todor el Rumanio de ME

Por la staĝo en Verdun, Rodica Todor el Rumanio estis invitita, por gvidi konversacian kurson kaj por prelegi pri Rumanio. Evidentiĝis, ke flugoj de Bukareŝto al Mulhouse estis plej oportunaj kaj rektaj vendrede. Tial ŝi alvenis la 3an de aprilo, por tuj poste pluveturi al Verdun kaj hejmenflugis la 17an de aprilo.

Intertempe ŝi partoprenis la staĝon en Verdun. Poste Ginette akceptis gastigi ŝin kaj organizis rekontiĝojn kaj prelegojn. Ekde la 10a de aprilo, ŝi partoprenis en Dijon IFEF-kunvenojn. Ŝi estas prezidantino de IFEF (Internacia Federacio de Esperanto-Fervojistoj).

La 15an de aprilo ŝi revenis al Mulhouse. Tial ni sukcesis organizi agrablan renkontiĝon kun kelkaj membroj de Mulhouse jaŭde vespere en restoracio "Le Vinci" en Sausheim.

Okazis viglaj babiladoj kun emociaj rememoroj pri pasintaj vojaĝoj al Rumanio fare de Roberto, kiu ekŝatis tiun landon. Ni eksciis pri multaj malfacilaĵoj en Rumanio en komunisma periodo.

Sed ankaŭ viglis diskutoj pri estontaj aranĝoj. Rodica preskaŭ ĉiu-jare organizas turismandon tra sud-orienta parto de Rumanio. Por la ĉi-jara aranĝo, komence en junio, jam ne restas lokoj.

Ekestis ankaŭ propono organizi en Alzaco la IFEF-kongreson por 2017. Vizitinte la urbon Colmar, Rodica komprenis la multajn turismajn eblecojn en Alzaco kaj la mirindan eblecon viziti la fervojistan muzeon en Mulhouse.

Jen novaj defioj por nia grupo.

Andreo



## "Vivu via strato" dum 10 dimanĉoj en Mulhouse

Yves Stutz refoje proponas al vi partopreni en tiu evento, dum 10 dimanĉoj de la 24a de majo ĝis la 26a de julio, ĉiun dimanĉon de la 10a30 ĝis la 12a30. La tuto okazas laŭ la bordo de la rivero ILL, trans la ponto proksime de la kampadejo de Mulhouse.

Tie estas metita je nia dispono tablo kaj seĝoj. Eblas informi kaj babilu kun la preterpasantoj pri Esperanto kaj krei kontaktojn. Tamen



la principo estas, nenion vendi, nenion aĉeti. Ĉio estu senpaga.

Tial se vi deziras surloke manĝi, prefere vi kunportu viajn piknikaĵojn kaj ĝuu la naturon kaj la printempan veteron.

Plej oportune estas parki apud la enirejo de la kampadejo kaj transiri piede sur la ponto al la alia flanko.

Refoje ni organizos la deĵoradon per nia dissendo-listo.

## Verdaj fadenoj por amike babili nur en Esperanto

La 27an de aprilo okazis la nia verda fadeno en Saint-Louis. Ni estis entute 7 ĉeestantoj.

Ni diskutis pri diversaj aferoj kaj interalie pri la printempaj aranĝoj:

- ◆ Verda fadeno
- ◆ Vivu via strato
- ◆ Amika tago
- ◆ Jarfina manĝo.



La venontaj datoj por la verdaj fadenoj estos:

- ◆ 18an de majo en Mulhouse. Pro Pentekosta lundo, ĝi okazos en la antaŭa lundo. Krome Jacques informos nin pri nova kafejo por nia rendevuo, ĉar la kafejo Le Printemps estas nun fermita.
- ◆ 29an de junio en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint-Louis.

# Amika tago en Saulxures-sur-Moselotte organizita de Ginette

Por la amika tago de la 13a de junio, mi planas tion:

Je la 10a30; rendezuo en Saulxures-sur-Moselotte sur la ĉefa placo, apud la monumento pri mortintoj. Tie ni dispartigos la ĉeestantojn en malpli da veturiloj. Je la 11a30: dua rendezuo en Remiremont sur la parkejo de "Plan d'eau". Borde de ĝi, ni piknikos sur la tieaj benkoj.

En kazo de pluvo, ni manĝos en Cora aŭ en restoracio (mi devas esplori pri la plej bonaj kaj ne tro kostaj, kaj havantaj parkejon)

Je la 14a, ni ekiros veturile ĝis "Fort du Parmont", kie mi rezervis gvidanton de la 14a30 ĝis la 16a. La kosto estas 2 eŭroj.

Post tiu vizito, restos eblo promeni en naturo apud tiu fuorto, aŭ iri en Muzeon en la centro de la urbo, se pluvos.

**Notoj:** la homoj povos kunveni ĉe la unua aŭ ĉe la dua rendezuo. Mi preferus pikinikon kaj promenon en naturo. Tamen se pluvos, mi rezervas antaŭe en eventuala restoracio kaj en la Muzeo.

Mi konfirmos la lokon de la manĝo kelkajn tagojn antaŭe, mi tamen konservas la ideon pri rendezuo je la 11a30 ĉe "Plan d'eau" (artefarita lago). Ĝi estas agrabla loko. Oni povas trovi multajn informojn pri Fort du Parmont kaj Plan d'eau sur la reto.

## Alvoko al la esperantistoj

Ni estas ĉiuj mondaj civitanoj, ĉar ni loĝas ĉiuj en sama loko: la mondo, nia komuna bono. Laŭmezure kiam la homoj devis alfronti la malfacilaĵojn de sia ekzisto, ili progresive identiĝis kun la tribo, la vilaĝo, la teritorio kaj la ŝtato, multigante kaj diversigante ĉiam pli la necesajn interŝanĝojn je sia postvivo. Jam de kelkaj jardekoj ili serĉis pliampleksi la cirklon preter la historiaj landlimoj.

Ĉu nova etapo? Jes sed ne tre bona por ili, ĉar bedaŭrinde, tie ne plu temas pri ilia postvivo. Male, trompa tutmondiĝo orkestrita de blinda ultra-liberalismo, havas nur unu celon: la profito. Rezulto: ĉie multiĝas ekonomiaj kaj sociaj krizoj kaj ekologiaj katastrofoj. Kiu do povus prudente pensi, ke ni nun travivas homan progreson? Tamen, la scienca kaj teknika disvolvado neniam atingis tian altan gradon, eĉ se bedaŭrinde ĉiuj ne sammaniere profitas de ĝi. La nuna tutmondiĝo kondukas nin al sakstrato, kaj pri tio multaj el ni konsentas. Certe, post la lastaj mondaj militoj oni jam komprenis, ke la paco kaj malsato en la mondo, la protekto de la homaj kaj popolaj rajtoj, kaj la zorgo pri la medio ne povos trovi efikajn kaj daŭrajn solvojn ekstere de internaciaj instancoj. Pro tio naskiĝis la LDN (ligo de nacioj) post la unua mondmilito kaj la UN (unuiĝintaj nacioj) post la dua. Sed malgraŭ la volo la sincereco la kompetencoj de multaj de iliaj membroj, la



nura rezulto estas, ke la okcidentaj landoj ne plu komunikas per armiloj sed ĉirkaŭ diskuto-tablo: malpeza rezulto kompare al la mizeroj, kiuj trafadas nian mondon. Kial?

Pro tio, ke ĉirkaŭ tiuj internaciaj tabloj obstinas la ŝtataj egoismoj: unue la protekto de siaj propraj interesoj, kaj poste tiuj de la aliaj. Vere, tiu al ni altrudita tutmondiĝo estas tre fora de la deziroj de miliardoj de mondoloĝantoj. Kaj inter ili, ia Boutros Ghali, Ĝenerala sekretario de UN (1992-1997). Ni aŭskultu ilin: “necesas ke la ŝtataj membroj de UN, akceptu demokration. Necesas, ke tiu instanco evoluu al nova fazo. Se ne, la planedo restos ferma kampo de politikaj rivalecoj inter la nacioj”.

Ni aŭskultu alian aŭtoritatan voĉon, tiu de alia ĝenerala sekretario de UN Kofi Anam (1997-2006): “mi konscias pri la nekapablo de UN agi fronte al la defioj de la venonta mondo, kaj de la neceso radikale reformi la organizon aparte ĝian konsilantaron de Sekureco nek reprezentan nek demokratian” Unu justa tutmondiĝo: jen la nova etapo dezirata de tiuj ambaŭ eminentuloj kaj ankaŭ de centoj de aliaj famaj personuloj de ĉiuj medioj.

Ni mencias nur kelkaj el ili: Edgard Morin, Hubert Rivees, Georges Moustaki, Annie Ernaŭ ne forgesante la forpasintajn: Albert Jackard, Alexandre Minkowski, Paul Emile Victor ktp. . . .

Ili atentigas nin: la solvoj estos trovitaj nur monskale kadre de mondaj sendependaj instancoj, demokratie elektitaj de la moncivitanoj, kaj postulantaj de la nacioj la forlason de iom de ilia suvereneco je la servo de la homaro kaj planedo.

Pri Esperanto, la lingvo de ĉiuj en la mondo, la nura kiu vehiklas mesaĝon de universalismo kaj solidareco inter la popoloj, ĝiaj samideanoj devas akompani, kaj forte subteni la disvolvadon de sava mondcivitaneco. Temas pri arda sindevigo, despli ke nia lingvo strikte neŭtrala sendube estos konsiderata kiel la plej taŭga komunikilo inter la popoloj en la venontaj oficialaj mondaj instancoj.

Fariĝu oficiale mondcivitano, kaj ĉirkaŭ vi invitu familion kaj geamikojn same fari. Per tiu persona ago, ĉiu asertos tiam sian volon partopreni la lantan kaj malfacilan sed neeviteblan marŝon al pli justa kaj pli frateca mondo. Cetere esti registrita kiel mondcivitano, ebligos vin voĉdoni je la venonta elektado de la “assembleo de la popoloj” (la registrado senpagas). Dum sia historio Esperanto travivis entuziasman epokon ĝis la tridekaj jaroj, nigran periodon dum la dua terurega mondkonflikto, renaskiĝon post la milito kaj nuntempe lantan evoluadon. Kun la mondcivitaneco, kiun prudento kaj saĝo iom post iom altrodos, nia lingvo povus ja koni novan entuziasman impeton.

Pliaj informoj ĉe: [www.recim.org/cdm/form-fr.htm](http://www.recim.org/cdm/form-fr.htm)  
aŭ: <[ginettepineda@numericable.fr](mailto:ginettepineda@numericable.fr)>

# Rigardo al la Bavelo-Kalendaro 2015

13.-17.05. Bad Münders Printempa BARO 2015  
15.-17.05. Herzberg 69-a Studsesio (Pedagogia Klerigado)  
22.-25.05. Hameln **92. Deutscher Esperanto-Kongress**

03.-07.06. **Goisern (A)**  
„Blue floras la genciano“ la 11a - kaj lasta!  
13.06. **Remiremont (F) Amika Tago Freiburg-Gérardmer**

05.07. **Villingen Blumenwanderung**  
11.07. **Stuttgart LERNI - INSTRUI - ĜUI**  
11.-19.07. Martin (SK)  
8-a Somera Esperanto-Studado (SES 2015)  
15.-26.07. Esztergom (HU)  
37-a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF)  
18.-24.07. Oostende (B)  
48-a ILEI-Konferenco (Esperantistaj Instruistoj)  
25.07.-01.08. Lille (F)  
100-a Universala Kongreso de Esperanto (UK)

01.-08.08. Strasburgo (F)  
21-a Ekumena Kongreso de IKUE kaj KELI  
02.-09.08. Wiesbaden 71-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)  
08.-15.08. Nitra (SK) 88-a Kongreso de SAT  
09.-16.08. Marburg  
25-a Kafoklaĉa Internacia Somera renkontiĝo (KISO)  
10.-17.08. Szentgotthárd (HU)  
26-a Internacia Junulara Semajno (IJS)  
22.-29.08. San Benedetto del Tronto (I)  
82-a Itala Kongreso de Esperanto

25.-27.09. Poznan (PL)  
31-aj ARTaj KONfrontoj en ESperanto (ARKONES)  
26.09. **Stuttgart LERNI - INSTRUI - ĜUI**  
30.09.-04.10. Herzberg TORPEDo 10 (Pedagogia Klerigado)

04.10 ? ? ? **Strasburgo (F) BAVELO-WANDERUNG**  
16.-18.10. **Pforzheim 37. BAVELO-Seminar**

20.11. **Villingen Zamenhof-Festo**

06.12. **Stuttgart Zamenhof-Festo**  
12.12. **Freiburg Zamenhof-Festo kun Bazelo kaj Mulhouse**  
??12.-??01. kie? 14-a Novjara Renkontiĝo (NR)  
27.12.-03.01. Eger (HU) 7-a Junulara Esperanto-Semajno (JES)

# Nia Kalendaro 2015

<b>majo</b>  <b>2015</b>	12 - 22 - 29	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a30 ĝis la 17a
	18	Lunda verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30
	11 - 18 - 26	Esperanto-kurso por komencantoj en Maison du Temps Libre en Mulhouse lunde de la 14a30 ĝis la 15a30 Alia kurso de la 16a30 ĝis la 17a30
<b>junio</b>  <b>2015</b>	13	Amika tago en Remiremont organizita de Ginette kun partopreno de Frajburganoj
	18	Komuna jarfina manĝo en Bartenheim
	19-26	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a30 ĝis la 17a
	1-8-15-22-29	Esperanto-kurso por komencantoj en Maison du Temps Libre en Mulhouse lunde de la 14a30 ĝis la 15a30 Alia kurso de la 16a30 ĝis la 17a30
	24	Unua dimanĉo por "Vivu via strato" de la 10a30 ĝis la 12a30 en Mulhouse
	29	Lunda verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30



Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



## Roberto: en lernejo en Ĝenevo

